

Numero: 275.  
Aprilo: 2015.

23-a jarkolekto

## Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefono: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## Lingvoĥaoso en stacidomo

Antaŭ nelonge mi akompanis mian eksterlandan amikon al la stacidomo de nia urbo. Li vojaĝis al Budapeŝto per trajno. Ni devis atendi almenaŭ kvaronhoron ĝis la ekveturo. Dume la laŭtparolilo informis la vojaĝantojn pri la alveno kaj ekiro de la trajnoj.

Unue estis aŭdebla hungare kaj poste la hungara teksto estis ripetita en angla kaj germana lingvoj.

Mia amiko estis franco. Verdire li flue parolis angle, sed malgraŭ tio lin tre ĝenis, ke li ne aŭdas la informojn en sia gepatra lingvo. Ja ankaŭ la franca estas mondlingvo.

Vane mi provadis klarigi al li, la germana estas parolata lingvo en Hungario, ĉefe en Transdanubio pro la proksimeco de Aŭstrio kaj pro nia komuna plurjarcenta historio. La angla estas jam disvastiĝinta en la tuta mondo kaj ĉie sur la tuta terglobo ĝi estas uzata. Mian amikon mi ne povis trankviligi. Laŭ li estus bezonata uzi ankaŭ la francan lingvon por informi la eksterlandajn vojaĝantojn. Kial li estas distingita kaj kial oni devigas lin, ke li sciu kaj komprenu tiujn ĉi du lingvojn. Ankoraŭ mi ne menciis la hungaran, kiun li kompreneble ne deziris ellerni. Laŭ li nia lingvo estas tro malfacila kaj stranga.

Eble li pravis – mi konsentis post iom da tempo. Kial aliaj homoj diras al mi per kiu lingvo mi komuniku?

En ĉiu ekzistanta lingvo ne eblas informi la homojn, ĉar dume la trajno foriras kaj la vojaĝantoj restos en la stacidomo.

Krome Kaposvár ne estas tro granda turista centro por ke ĝin vizitus dekmiloj da turistoj el la tuta mondo.

Tamen laŭ mi la unusola solvo estus, se la homaro elektus komunan lingvon, kiu estus universale uzata sur ĉiu tereno de la vivo.

Por mi estus ĉiela stato, se tiu ĉi lingvo estus Esperanto.

Esperantistoj bone scias ĝiajn utilojn. Mi nun ne devas klarigi al vi, kial ĝi povus plenumi tiun ĉi rolon.

Mi jam nun antaŭvidas, kio okazos, se baldaŭe min vizitos hispanaj, rusaj, turkaj, grekaj, italaj kaj diverslingvaj geesperantistoj. Ĉu ili ĉiuj ŝatus aŭdi la horaron de la ekveturantaj trajnoj en sia gepatra lingvo?

Tiam okazos vera lingvoĥaoso en la stacidomo de la urbo Kaposvár.

**-Redaktanto-**



## Kelnero kaj eksterlandano

Konate, ke la kelneroj ofte renkontiĝas kun eksterlandanoj, kiuj volonte vizitadas hungareskajn restoraciojn.

Hungario famas pri sia bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Antaŭ nelonge okazis en iu malgranda, hungara urbo proksime al Balatono. Gastoj alvenis el la najbara lando Aŭstrio. Granda aŭtobuso haltis antaŭ la ĉardo. La pasaĝeroj invadis la kanotegmentan domon kaj altabliĝante ili petis menuokarton de la kelnero.

Li estis juna viro kaj ŝajne nelonge laboras en la ĉardo. Krom li en la ejo ne estis alia kelnero. Liaj kolegoj forestis. La ĉardestro vokis ilin al si por preparoli gravajn aferojn.

La juna kelnero ne komprenis, kion deziras la aŭstraj gastoj. Li stultete ĉirkaŭrigardis atendante, ke fine alvenos „la savanta armeo” kaj solviĝos la komika situacio.

Li ne parolis la germanan lingvon. Inter la aŭstroj ne estis hungare parolanta persono. La fremdulgvidanto ankoraŭ aranĝis ion en la aŭtobuso kun la ŝoforo.

La alvenintaj gastoj mane kaj piede ekprovis klarigi, ke ili deziras tagmanĝi kaj petas menuokarton por elekti iun specialan hungareskan manĝaĵon.

La juna kelnero nervoze kuradis inter la tabloj. En ĉiu sekundo li ŝetis rigardon al tiu pordo, kie liaj kolegoj malaperis kaj oni ne scias, kiam ili revenos.

Estis granda ĥaoso en la ĉardo. Ĉiu kriegadis kaj per fingro montradis al la buŝo.

La malfeliĉa jam preskaŭ ekploris. Li ankoraŭ neniam estis en tia malfacila situacio. Li ne sciis, kiel solvi tion ĉi.

Ĉirkaŭ ĉardo ĉiam estas trovebla drinkemulo, kiu kun botelo da biero rigardaĉas scivoleme. Ankaŭ nun en la fora angulo apud tablo sidis persono. Kvazaŭ lia figuro estus aparteninta al la ĉardo. Oni pensis, ke li estas indiferenta, kio okazas ĉirkaŭ li.

Kiam li jam ege tedis tiun ĉi teruran renversion, li ekstaris kaj alpaŝis la kelneron.

-Knabo, donu al ili menuokarton! Ili deziras tagmanĝi. Tion ili klarigas al vi.

Kiel lampo, kiam ĝi ekbrilas en malhela ĉambro, tiel disvastiĝis la lumo en lia kapo. Li tuj komencis disdonadi la menuokartojn. Li ĝuste metis la lastan sur la tablon, kiam la kolegoj revenis. Ili demandis:

-Ĉu estis problemoj?

-Ho ne, mi solvis ĉion. Ili deziras tagmanĝi kaj mi donis al ili menuokarton.

**-Ŝaŝa-**

# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
X-a

Johano cerbumis, kiel liberiĝi el tiu ĉi terura situacio. Certe la onklino Izabela jam serĉas lin kaj Luna Polico (LP) sciiĝis pri lia malapero.

Estus bone scii, kiom longe li estas en tiu ĉi kelo. Li ne trovis sian brakhorloĝon. Ĉu ĝi perdiĝis aŭ oni ŝtelis ĝin?

Ekstere la ombro ne movis. Kvazaŭ ĝi estus fiksita al kolono, kien ĝia posedanto kaŝiĝis por ke oni ne vidu lin.

Johano sciis kaj sentis, ke malantaŭ la kolono staras iu.

Kion li deziras? – Tio ĉi estis la demando. – Oni ŝlisis lin en tiun ĉi malhelan, malseketan kelon. Kiam Johano ekscios, kial okazis tiu ĉi teruraĵo?

Estus bone scii, kie estas Elinjo, tiu ĉarma knabino kun kiu li vespermanĝis kaj amuziĝis en la restoracio.



Antaŭ nelonge li havis grandegajn planojn pri Elinjo. La junulino tre plaĉis al li. Kvankam li konis ŝin nur de post kelkaj tagoj, sed en sia koro li sentis, ke li enamiĝis al ŝi.

Li ne volis kredi, ke Elinjo estas kaŭzita pro lia forrabo. Eble ankaŭ ŝi estas tie ĉi ie ŝlosita kaj nun ŝi suferas atendente lin.

Li ne sciis, kion fari?

Komence li volis kriadi, ke oni liberigu lin. Jam preskaŭ li ekkriis, sed en la lasta momento li ŝanĝis sian decidon.

Estos bone silenti kaj atendi la taŭgan okazon, kiam li mem povos liberiĝi. Eble baldaŭe oni envenos por kontroli lin.

Li ĝuste pensis. Apenaŭ pasis kelkaj minutoj, novaj paŝoj aŭdiĝis el la malproksimo. La paŝoj fariĝis pli laŭtaj kaj haltis ĉe la kolono. Baldaŭe parolado estis aŭdebla, sed tion Johano ne komprenis. Ili parolis mallaŭte kaj en iu nekonata lingvo.

Kiam la babilado silentiĝis la parolantoj subite venis al la pordo. Bonŝance ankoraŭ Johano havis tiom da tempo, ke li povis rekuŝiĝi al la tablo imitante dormon. Duone malfermante okulojn li vidis la alvenintojn. Unu estis malgranda kaj

strangaspekta ulo. Li tute ne similis al la ĉi tieaj homoj. Lia kapo estis timiga kaj kukurboforma. La alian ne tro bone li vidis. Sed ŝajne li aŭ ŝi apartenis al la luna raso. Eble ŝi estis virino ĉar ŝi surportis juposimilan vestaĵon. Verdire ŝia voĉo estis raŭka kaj tre similis al viro. Sed ankaŭ sur Tero vivas tiaj virinoj, kiuj perdis sian belan virinan voĉon pro fumado. Bedaŭrinde tiun ĉi malbonan kutimon oni ne povis ĉesigi. Kvankam okazis multaj provadoj sensukcese.



Johano kuŝis senmove sur la tablo. Ankaŭ la rimenojn li ĉirkaŭigis la brakojn. Du estaĵoj ne rimarkis la liberiĝon. Ili kontente ĉirkaŭiris la tablon ankaŭ plurfoje.

Ili volis forlasi la ĉambron kaj kiam ili ne rimarkis, Johano desaltis de sur la tablo kaj fulmrapide piedbategis ilian dorson. La virinosimila estaĵo tuj falis surteren kaj ŝi ne movis plu. Sed la kukurbokapulo restis staranta. Li turnis sin kaj li ĵetis kolere manrigardon al Johano. Li movis maŝine, kvazaŭ ĝi estintus roboto. Ĉio okazis rapidege. La estaĵo eltiregis ion el sia poŝo kaj ĝi estis direktita al la okuloj de Johano. Li vidis nur etan fulmon kaj la tuta mondo malheliĝis. Ekde tiam li rememoris pri nenio.

Kiam li malfermis siajn okulojn li trovis sin en brila salono, kie estis aŭdebla agrabla, mallaŭta muziko.

(-daŭrigota-)



# Poezio

La Zamenhofa lingvo ofte estas akuzata, ke ĝi estas senanima, artefarita kreaĵo. Ĝi neniam povos konkuri kun vivaj, naciaj lingvoj.

Malprave, ĉiuj geesperantistoj bone scias, nia lingvo havas riĉan literaturon kaj en „Esperantujo” naskiĝis grandiozaj verkistoj kaj poetoj.

Ni hungaraj geesperantistoj povas esti fieraj, ĉar ni donis al la mondo famulojn. Mi nur menciu la plej grandajn: Baghy Gyula (Julio Baghy) kaj Kalocsay Kálmán (Kolomano Kalocsay). Ankoraŭ mi longe povus vicigi la nomojn.

Do, neniŭ pensu, ke nia lingvo estas duaranga kaj muzoj ne kantas por ni en Esperanto.

## *Ekĉirpas jam hirundo...*

**elegiptigis K. KALOCSAY**

**Unue aperis en la nica literatura revuo 6/6  
(n-ro 36) p. 202**

Ekĉirpas jam hirundo:  
"Tagiĝas, kien nun do  
vi iros for de l' dolĉa lok'?"  
-- Ho birdo, mi ne iras  
ankoraŭ, al mi ŝiras  
la koron la disiga vok'.  
En ŝia ĉambro mi, beata,  
troviĝas kun ŝi, la amata.  
Ni ambaŭ krie voĉas,  
ke mi ne iros for,  
kaj ni en amfervor'  
la manojn interkroĉas.



## *Mi kuŝos hejme en la lito ...*

**elegiptigis K. KALOCSAY**

Mi kuŝos hejme en la lito  
malsane de ĉagren',  
najbaroj venos por vizito,  
sed vanos ĉies ven'.  
Sed se viziton al mi farus  
la amatin' subite,  
ja ĉiuj kuracistoj starus  
ĉi tie hontigite,  
ĉar ŝi esploron ne bezonas,  
malsanon mian bone konas.



## *Amato, mia kara ...*

**elegiptigis K. KALOCSAY**

**Unue aperis en la nica literatura revuo 6/6  
(n-ro 36) p. 203**

Amato, mia kara,  
mi diros, kiofara  
mi estas nun: mi birdojn ĉasas.  
Per uz' de ruza saĝo,  
per gluo kaj per kaĝo  
tiuj sin trompi kaj sin kapti lasas.  
Alflugas birdoj buntaj  
de sur la bordoj Punt-aj,  
kaj ĉiu estas mirhe dolĉbalzama.  
L' unua, kiu venas,  
la vermon vidas, prenas,  
kaptiĝas tuj en la momento sama.  
Ho, kiel de parfumoj  
de Punt' odoras plumoj,  
kaj ĝiaj ungoj plenas de rezino!  
Mi havas la deziron,  
malfermi la kaptilon  
kun vi, trezor' de mia kor-inklino.  
Tre dolĉas kune preni  
kaj en la manoj teni  
la birdon odorantan de balzamo,  
plej dolĉas sur la fero,  
plenplene de tenero  
al kampo iri, al amat', por amo!



## *La amo de l' amata estas trans la Nil' ...*

**elegiptigis K. KALOCSAY**

**Unue aperis en la nica literatura revuo 6/6  
(n-ro 36) p. 203**

La amo de l' amata estas trans la Nil',  
la akvo ŝin de mi dividas.  
Sur la rivera bordo kuŝas krokodil',  
tra l' akvo mi al ŝi rapidas.  
Kuraĝa estas sur la akvo la anim',  
kaj kiel tero sub la pland' la ondo!  
La amo, ŝia amo faras forta min  
kaj ŝirmas per magia rondo.



# Por infanoj

## La malkuraĝa drako

-dua parto-



Li longe cerbumis kaj li estis senkonsila. La reĝidino tre plaĉis al li. Tamen li ne volis murdi la sepkapan drakon. La vagabondo vidis, kiom tremas la malfeliĉa besto de li. Ĝi donus ĉion al li, por ke ĝi savu sian vivon. Fine la drako petegante diris:

-Detranĉu miajn ses kapojn la sepan lasu al mi! Tiel mi saviĝos kaj ankaŭ vi plenumos vian taskon kaj la reĝo estos kontenta.

La ideo plaĉis al la vagabondo kaj li tuj detranĉis la ses kapojn de la drako. La sepan li lasis sur sia loko. Li eksidis sur la dorson de la unukapa besto kaj ekrajdis al la fortikaĵo de la reĝo.

El la turo la gardisto vidis, ke iu stranga bestego proksimiĝas al ili. Li senhezite alarmis la tutan reĝan kortegon. Ĉiu pensis, ke la sepkapa drako murdis la vagabondon kaj ĝi venas por la reĝidino.

Ekploris la homoj, eĉ ankaŭ la reĝo kaj komencis adiaŭi de sia amata filineto.



Estis granda surprizo, kiam oni ekvidis la vagabondon rajdi sur la dorso de la unukapa drako. La homoj komprenis nenion. Estis videbla, kel li sukcesis venki la drakon. Vere ĝi vivas, sed jam ĝi ne estas tiom timiga, kiel antaŭe, eĉ ĝi ŝajnis kurĉevalo. La vagabondo ne devis piediri en la estonto. La unukapa drako portis lin ĉien laŭ lia deziro.

Pleje ĝojis la reĝidino al lia alveno, ĉar eble preskaŭ mi forgesis mencii, al ŝi tre ekplaĉis la vagabondo.

La reĝo ne volis kredi je siaj okuloj.

-Tio ĉi ne povas esti vera – li diris al sia trezoristo. – Tiu ĉi junulo savis nin de la sepkapa drako kaj nun jam mi povos elekti indan edzon por mia filineto.

Li gaje salutis la vagabondon kaj li tuj proponis al li oron, arĝenton kaj diamantojn, ĉar li savis ilin de la drako.

-Filo mia, - li komencis. – Mi donas al vi tiom da trezoro, kiom vi povos hejmenporti.

Je tio la vagabondo fiere respondis:

-Mia reĝa Moŝto, mi ne bezonas oron, arĝenton kaj diamantojn. Mi deziras peti la manon de via belega filineto. Mi enamiĝis al ŝi kaj mi volas edzinigi ŝin.

-Sed filo mia, - eksaltis la reĝo – ŝin povos edzinigi nur grandsinjoro, kiu havas almenaŭ palacon. Kien vi portus hejmen via edzinon?

-Pro tio ne ĉagrenu mia reĝa

Moŝto – li diris ridante. – Mi havas insulon kaj sur ĝi estas belega palaco. Se vi ne kredas, venu kun mi tien! Sed akompanu vin ankaŭ la reĝidino, ĉar se ŝi estos tie, mi restigos ŝin por ĉiam.

La reĝo kredis, ne kredis kion la vagabondo diris. Por ke li konvinkiĝu pri la aŭdita parolo de la vagabondo, li kaj lia filino vizitis la insulon. La vagabondo ne mensogis, ĉar tie tiom belega palaco staris, ke ankaŭ la reĝo enviis ĝin.

Li ne kontraŭis plu la geedziĝon. Ankoraŭ en tiu ĉi tago okazis tiu ĉi brila ceremonio kaj la juna paro feliĉe vivas, se dume ili ne mortis.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

-Onklo Adalberto-



# Simioj Simioj

